

SANO

JARKOLEKTO 1984

NUMERO 2

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Medicinstaj kolektoj - S A N O – jarkolekto 1984 – numero 01 - Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj ruĝkrucaoj.

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicina sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto

Redaktas: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 718, Ĉeĥoslovakio
Grafika kunlaboranto : Jaroslav Klement, Karlovy Vary

Kiamaniere aboni al nia cirkulero:

KIAMANIERE ABONI AL NIA CIRKULERO :

BULGARIO: BULGARIA ESPERANTISTA ASOCIO, Chr. BOTEV 97- Sofia

ĈEĤOSLOVAKO: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA

G D R : Margit Volkmann, Zittaŭ, Gubenstrasse 19, GDR

HUNGARIO: D-ro ISTVANE GAJZADA, Kozalyi Mihaly u. 4/8, 1053 BUDAPEST

JAPANIO : SABURO YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9 GUNNA-KEN

POLLANDO: STEFANIA WOJCIECHOWSKA, 78-320 POLCZYN YDROJ, ul. 1. Maja 3/3

UEA : UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO? NIEŬWE BINNENWEG 179, BJ 3015 ROTTERDAM, NEDERLANDO

USA : BERN VHEEL, BOOKS, 834 WENONAH, OAK PARK, IL 60304

USSR : KLAIPEDA ESPERANTO-KLUBO, p.k. 179, 235 800 KLAIPEDA, Litovio SSR, Vladimir GAKALENKO, poste restante, TICH I 3



Malbonŝance nia gipsisto estas kubisto.

Imunoĥemio en la etkvanta analiza ĥemio

Inĝ. Zdeněk Pluhař

PRINCIPO DE LA METODOJ

La praktika uzado de la imunoĥemiaj reakcioj en medicino datiĝas jam ekde la fino de la 19-a jarcento. Temas pri la aplikado kaj utiligado de la fakto, ke la antikorpo reakcias kun la antígeno al ĝi respondanta, tio estas unu el aspektoj de t.n. specifa imuneca reakcio. La reakcio de antikorpoj kun antigenoj povas realiĝi en la organismo mem, sur tio baziĝas unu el la manifestiĝoj de la imunogena sistemo kaj la terapia aplikado de diversaj serumoj, sed ĝi povas funkcii ankaŭ ekster la organismo, en la laboratorio vitraĵo ("in vitro"), sur tio baziĝas la serologia diagnozado de infektaj malsanoj. Ĉar ĝis nun ĝenerale estas la fonto de la dezirataj antikorpoj, precipe por la diagnoza celo, la sanga sero de taŭga besto al kiu oni antaŭe injektis elektitan purigitan kaj diversmaniere antaŭpreparitan patogenon provokinte tiamaniere la organismon de la besto al la estigo de la specifaj antikorpoj, klinikaj bioĥemiistoj kaj kuracistoj ĝenerale klasifikas ĉi tiun subfakon de imunologio kiel serologion. Fakte ĝis nun plej ofte temis pri la studado de seroj kaj de la reakcioj en ili. Ĉi tradicio estos baldaŭ rompita pro la rapida evoluado de la gena inĝenierio, estis jam faritaj sukcesaj provoj kun la sintezaj vakcinoj, cetere la produktado de tiuspecaj medikamentoj helpe de mikroorganismoj aŭ per la ĉelaj, resp. histaj kulturoj estas jam ankaŭ deflankiĝo de la tradicia serologia ŝemo. Tial ni restu en ĉi tiu artikolo ĉe la pli ĝenerala nocio imunoĥemio. Estas superflue plu klarigadi la imunologiajn aferojn al la fake kompetenta legantaro de ĉi tiu revuo. Ni nur ankoraŭ rememoru, ke anitgene povas efiki en nur patogenoj (mikroboj, virusoj, ks.), sed ankaŭ vico da aliaj grandmolekulaj kaj eĉ etmolekulaj substancoj. Kiel imunogeno, te. kompleta antígeno kapabla provoki la imunecan respondon (estiĝon de antikorpoj kaj sentivigitaj limfocitoj) kaj specife reakcii kun la antikorpoj kaj sentivigitaj limfocitoj kies estiĝon kaŭzis, povas funkcii diversaj grand-molekulaj substancoj - proteinoj, polisaharidoj, derivaĵoj de tiuj substancoj, ktp. La emolekula hapteno, nekompleta antikĝeno. povas funkcii kiel imunogeno post la antaŭa ligo kun la konvena grand-molekula portenco, ekz. nova sera albumino. Kaj tio estas la elirejo por larĝigo de la influksampo de imunoĥemio ekster la "klasikan" serologion. Analiajn ĥemiistojn allogas imunoĥemio precipe per la alta specifeco de siaj reakcioj. Cetere oni povas aserti, ke ankaŭ alia alte specifa metodo - bioafineca ĥromatografio - dankas pro sia kvalito al "imunoĥemiaj principoj", fakte ĝi estas tre proksima parenco de imunoĥemio.

La imunoĥemian metodon por la ĥemi-analizaj celoj uzis jam LUERS kaj OTTERSOOSER en la j. 1924 por la pruvo de saĥaromicetaj proteinoj en biera malkaraĵo. Tamen iom vigla evoluigado de la imunoĥemiaj metodoj en la analiza praktiko videblas nur la lastan jardekon, do temas sendube pri la novaĵo.

Ĝenerale estas por la ĥemi-analizaj celoj aplikeblaj ĉiuj serologiaj diagnozaj metodoj, se oni kapablas prepari sufiĉe efikan reakcenzon-seron ("antiseron"), kio ofte estas malpli facila ol en la klinika serologio, pro ne tiom klara difinebleco de la kondiĉoj.

Eble plej prilaborita por la ĥemi-analiza apliko estas la grupo de precipitaj metodoj. El ĉi tiu grupo estas interesaj precipe la reakcioj de la precipitado en ĝelo (ekz. agaro), pli ofte nomataj imunodifuzaj metodoj. En pli larĝa senco ni povas alkalkuli al ĉi grupo de metodoj ankaŭ diversajn imunelektroforezojn. Aplikeblas kompreneble ankaŭ aglutinajn metodoj por nesolveblaj antigenoj. El la prezentota supervido evidentiĝas, ke la plej esperdonaj estas la imunoradioizotopaj metodoj kaj imunoenzimaj metodoj, el la laste menciitaj precipe enzim-imuno-analizo (EIA), enzim-imuno-sorbenza analizo (ELISA la la angla "enzyme-linked EAn la aro da imunoĥemiaj metodoj precipe RIA apartenis al la plej bonaj tiukampe.

La indokrinologia aplikado jam videblas el la supraj alineoj. En toksologio oni povas determinadi toksinojn (jam estis sukcese analizataj aflatoksinoj), kancerogenojn kaj mutagenojn (ekz. benzpireno, etilkarbominato), alkaloidojn (ekz. morfino, kompleksaj lipidoj).

El la ĝisnuna ekspliko sekvas, ke en la sfero de la netradicia immunoĥemio la plej rpilaboritaj kaj disvastigitaj estas la precipitaj metodoj, la plej sentivaj kaj allogaj la imuno-radio-izoto-paj metodoj. Sed la aŭtoro ne dubas, ke en la proksima estonteco la imun-enzimaj metodoj estos minimume tiom allogaj kaj preskaŭ tiom sentivaj kiel la imunoradioiutopaj metodoj! Ni konsideru, ke la netradicia aplikado de immunoĥemio estas nur ĉe sia komenco. Se oni ne multe menciis iun metodon, tio ne signifas, ke ĝi ne estas bona, ĝi simple ne havis ankoraŭ sufiĉe da tmepo por pruvi siajn kvalitojn.

La disvastiĝon de la immunoĥemiaj metodoj en la ĵus diskutata kampo bremsas la fakto, ke ĝis nun nur malmultaj "antiseroj" estas fabrikataj kaj liverataj. Kutime la analizisto devas mem "fabriki" la necesajn preparaĵojn, aŭ mem trovi la produktanton (alian, eble pli spertan, laboratorion). Dumflanke la ilaro kaj aparatoj estas jam fabrikataj en sufiĉa kvanto, ili estas identaj kun tiuj uzataj en la "klasika" klinika serologio. Ni ankoraŭ akcentu, ke precipe la plej modernaj immunoĥemiaj metodoj estas realigeblaj kiel plene instrumentaj, kvant-analizaj metodoj, iam eĉ kun sufiĉa aŭtomatigo de la procedo.

De fabrikantoj de la necesa ilaro (serologiaj platoj, mikropipetoj ks.) estas relative longa vico en la mondo. Simile la helpajn ĥemiaĵojn (ekz. por bufraj solvaĵoj) liveras bonreputaciaj fabrikantoj de ĥemiaĵoj kaj bioĥemiaĵoj. El la fabrikantoj de kompletaj aparatoj ni nomu almenaŭ la svisan altreputacian firmaon DYNATECH AG, Zug.



LA MEDICINAJ KURSOJ DE L. ZAMENHOF

Bernard Golden

Estas sciata, ke la adoleska Ludoviko Zamenhof - li nomiĝis Lazaro tiutempe - estis elstara lernanto dum siaj gimnaziaj jaroj. Li ne nur ricevis la plej altajn notojn kaj ankaŭ medalon, sed eĉ pli grave, li estis akceptita por universitata studado. Post sukcesa trapaso de la maturekzameno en junio 1879, la 19-jarulo iris al Moskvo en aŭgusto por enskribiĝi en la Fakultato pri Medicino. Tie li restis dum la unuaj du jaroj de la kvinjara periodo de studado bezonata por fariĝi kuracisto.

Sendube interesos legantojn de S a n o detaloj pri la universitataj kursoj, kiujn frekventis la estonta kuracisto. Ĉu li tiutempe montris, ke li povos esti sukcesa kuracisto: Ĉu liaj notoj estis eminentaj por ĉiuj studobjektoj, aŭ ĉu kelkaj aspektoj de la medicina edukado estis malfacilaj por li? En tre utila konsultlibro titolita **Halina Dokumento pri la Studentaj Jaroj de L. L. Zamenhof** (Osaka 1977) troviĝas kopioj de oficialaj dokumentoj de la Dua Vira Gimnazio en Varsovio, la Universitato de Moskvo kaj la Universitato de V arsovio. Inter ili estas la rezultoj de la ekzamenoj por ĉiu jaro. Ili estis taksitaj per ciferoj: la plej alta - 5 - signifas "tre bone" aŭ "bonege".

En majo 1880 Ludoviko Zamenhof estis ekzamenita pri jenaj temoj: antaŭ ĉiu ekzamen-nomo estas la noto:

5 - Zoologio	5 - Medicina enciklopedio	5 - Neorganika ĥemio
5 - Mineralogio	5 - Germana lingvo	5 - Anatomio de sana homo
5 - Botaniko	5 - Fiziko	

Li estis promociita, kaj fine de la dua jaro en majo 1881 li ricevis la sekvajn notojn:

5 - Zoologio	5 - Fiziko	4 - Organika ĥemio
--------------	------------	--------------------

5 - Mineralogio	5 - Ekzercoj de kadavroj	4 - Fiziologio
5 - Neorganika ĥemio	5 - Farmacio+farmakognozio	3 - Histologio, embriologio,
5 - Botaniko		kompara anatomio

Zamenhof estis denove promociita, sed pro financaj malfacilaĵoj li ne povis resti ĉe la Universitato de Moskvo. Li petis permeson daŭrigi siajn studojn ĉe la Universitato de Varsovio, reiris al la familia loĝloko kaj estis enskribita kiel triujara studento en la Medicina Fakultato de la tiea universitato. Ĉe la fino de la 1881-1882 akademia jaro li trapasis jenajn ekzamenojn:

5 - Speciala patologio kaj terapio	5 - Oftalmologio	4 - Patologia anatomio
5 - Farmakologio	5 - Ĝenerala patologio	4 - Teoria ĥirurgio

Similaj estas la notoj ricevitaj ĉe la fino de la kvara jaro:

5 - Jurmedicino kaj toksologio	4 - Obstetiko
5 - Patologia anatomio	4 - Ginekologio
	4 - Higieno kaj polica medicino

En la fina jaro, 1883-1884, la notoj estas indikitaj ne per ciferoj sed per vortoj: tre kontentige, kontentige. Supozeble ili respondas al 5 kaj 4 respektive.

Tre kontentige:

Farmakologio kaj receptaro

Teoria ĥirurgio kaj oftalmologio

Kontentige:

Fiziologio, histologio, embriologio, med. ĥemio

Jurmedicino kaj toksologio

Speciala patologio + terapio kun psiĥiatrio

Higieno + polica medicino

Ĝenerala patologio

Ĝenerala terapio

Obstetiko + infanaj malsanoj

En januaro 1885 kuracisto L. L. Zamenhof subskribis la kuracistan ĵuron. La diplomo de la Imperia Varsovia Universitato, portanta la daton la 5-an de februaro 1885, formale donis al li la gradon de kuracisto.


Komparo de la poent-averaĝoj en ĉiu akademia jaro montras, ke Zamenhof estis pli sukcesa en la unuaj tri jaroj el en la lastaj du:

1879-1880 - 5,0; 1880-1881 4,6; 1881-1882 - 4,7; 1882-1883 4,4;

1883-1884 - 4,2.

La averaĝo por la tuta medicina studado estas 4,6.

Komparu tiun ciferon kun la averaĝa gimnazia noto 4,4, kiun Zamenhof ricevis surbaze de ekzamenobjektoj kaj objektoj sen ekzameno. Estas evidente, ke Z. kiel gimnaziano kaj kiel universitatano eminentis.



NOVAĴOJ

POSTER/O (scienca afiŝo)

estas la nova formo de sciencaj sciigoj, uzata dum kongresoj per du koridoraj afiŝoj sur grandaj ambaŭflankaj tabuloj kun diagramoj kaj bildoj aŭ fotografiaĵoj, kiuj koncize informas la spaktanton pri rezultoj de scienca laboro, kiu ligas sin al la ĉeftemo de la scienca konferenco aŭ unuopa ĝia prelego, aŭ memstare informas pri iu paralela temo. Avantaĝoj: Dume oni povas prezenti per prelegoj dum unu kongresa tago maksimume 25-30 referaĵojn buŝe, la publikiga kapablo de posteraj estas multe pli granda. Ĉe postero sumiĝas interesuloj pri la temo, kiuj tuj diskutas. Se la diskuto estas en fremda lingvo, la diskutantoj trovas sur postero la plej gravajn nociojn. La aŭtoro povas prezenti pli grandan nombron da diagramoj ol la aŭskultanto kapablas du perbuŝa prelego ekkompreni. La prepartempo mallongiĝas, ne necesas prepari diapozitivojn. Kion eviti? Posteraj ne devas enhavi multe da teksto. Necesas limigi ĝin al enkonduko kaj resumo, eventuale metodiko. La teksto devas esti legebla el distanco de 2 metroj. Unukoloreco malhelpas, bunteco estas preferata. Necesas prepari sin al pli profunda diskuto, kiu okazos ĉe la postero!

RIMARKO DE LA GRAFIKISTO

La nova vorto "postero" (fakte sinonimo de "afiŝo") devenas - kiel nun preskaŭ ĉiuj novaj "internaciaj teknikaj terminoj" el la angla lingvo, kie ĝi - almenaŭ laŭ la lasta angla-ĉeĥa kaj ĉeĥa-angla vortaro - signifas ne nur "afiŝon", sed ankaŭ "gluiston de afiŝoj". La vorto invadis preskaŭ ĉiujn eŭropajn lingvojn post eksplodo de tn. "panel-diskutoj", nuntempe kutimaj dum la internaciaj teknikaj konferencoj. Laŭ mia opinio sufiĉus uzi aŭ la vorton "panelo", aŭ simple "afiŝo". La vorton "panelo" nun oni ofte uzas por plataj elementoj de ekspozicioj !aŭ artaj aŭ teknikaj), sed estas fakto, ke tiujn ĉi "panelojn" preparas specialaj grafikistoj, "enspirantaj vivon" al ideoj de la teknikistoj, kiuj preparas tn. "enhavan scenaron" de la ekspozicioj. Por ni - grafikistoj - "postero" por ĉiam restos ideo de bone grafike preparita kaj

reklamefika afiŝo. (Laŭ PIV pĝ. 786 "panelo" ankaŭ signifas - ĉeĥajn "transparentojn kun politikaj sloganoj - signifo "5" en PIV).

Jroslav Klement



TRANSPLANTO DE LA ĈELKULTURO DE LANGERHANS-INSULETOJ

Post transplanto de la tuta pankreato (unuan fojon Kelly 1966), de ĝia segmento !Guanarsson) kaj Langerhans-insuletoj (memkompreneble kun almikso de ekzokrina histo) estas implanto de la kulturo de insuletaj ĉeloj (Sutherland, Sumakov, Najarian), la plua kaj ŝajne la plej facila pruvo de kaŭza terapio de diabeto.

La aŭtoroj disponigas literaturan trarigardon kaj raportas pri propraj 16 implantoj, ĉe kiuj ili transportis kulturojn de ĉeloj, ajnitajn de 4-6 montaj fetoj en unu kazo en lienan pulpon, ceterokaze en rektan abdomenan muskolon. Plua estas eblo de hepata apliko.

La ricevintoj estis malsanuloj pro ŝancela diabeto kun evoluintaj diabetaj komplikoj. Ĉe parto da ili okazis statistike signita malaltigo de la dozaj de ekzogena insulino. En kelkaj kazoj oni povis la insulinon eĉ tute ellasi. Ĝenerale cedis la manifestantaj signoj de diabetaj komplikoj - antaŭ ĉio neforigeblaj doloroj de malsupraj korpomembroj en kradro de diabeto neŭropatio - eĉ proteinurio kaj nedaŭraj ŝanĝoj de okula fono. Sed la favora efiko estas ankoraŭ nur efemera!

Estas interese, ke estis aplikita nek imunosupresiva kuracado, nek antigena tipigo antaŭ la implanto.

Literaturo: Sumakov V. I., Blumkin V. N. et al.: Transplantacia kultur ostrovkovykh kletok podželudeĉnoj ĉŝelezy ĉeloveka bolnym sacharnym diabetom. Klein. Med. (Mosk), 1963, 61, n. 2, p. 46-51.

DE AIDS ĜIS SIDS

Meze de la jaro 1983 mi prezentis ĉe la Internacia Medicina Esperanto-Kongreso en Ĉeĥoslovakio aktualan referaton pri homoseksualeco kaj AIDS. Laŭ recenzentoj la temo estis "ekstreme interesa", "konsiderinde informa", "Nekredeble nova", sed ankaŭ "dank'al Dio en Orienta Eŭropo ankoraŭ nekonata" kaj atesto "de socia malbono en Okcidento". La pli multe pozitiva eĥo daŭras plu en leteroj kaj citaĵoj - kaj la prelego restas plue science valida. Kion la medicina fakgazetaro, ĵurnalistiko kaj televido ĝis hodiaŭ plie alportis, tion mi registris kaj prilaboris pli sube, kompletigante la prelegon je la stato de decembro 1983.

En Usono 2000 aids-malsanuloj estas ĝis nun registritaj, en Okcidenta Germanio 40 (novembre estis en kliniko 14 en Munkeno, 7 en Frankfurto, 6 en Berlino kaj 8 en Hamburgo), eb Svisio 20. informriĉajn tabelojn prezentis la scienca redakcio de la franclingva Svisa Televido komence de novembro 1983:

10 el la 20 aids-kazoj en Svisio koncernas samseksemulojn, 5 afrikanojn kaj 5 aliajn.

Tutmonde la aids-pacientoj estas grupigitaj jene:

samseksemuloj	55%
afrikanoj	25%
haitianoj	5%
tokso-maniuloj	3%
hemofiliuloj	2%
aliaj	10%

Alia listo indikas jenajn kontaktaĝ-originojn:

USONO	30%
Centra afriko	25%
Haitio	8%
Eŭropo	15%

sangotransfuzo	2%
aliseksemuloj	18%
aliaj	2%

Laŭ "Praxikurier" de la 14-a de septembro 1983 la usonaj tribunaloj estas inundataj de ondo de procesoj, ĉe kiuj aids-viktimoj riproĉas al siaj sekspartneroj, ke ili infektis ilin. Transfuzo-ricivintoj akuzis bankojn de l'sango pro tio, ke ili malsaniĝis je aids sekve de transfuzo de sango.

Kontraŭ tio ŝajne apenaŭ zorgigas la fakto, ke 50% de la amerika loĝantaro estas infektita de toksoplazmoj (laŭ "Press Release Stanford University Medical Center - News Bureau", 1983-06-13). - La fenomeno aids ĉiukaze damaĝis en Usono la homoseksualan movadon: samseksemuloj jam ne plu rajtas eniri multajn naĝejojn (laŭ Praxikurier, 1983, 11-09, H.V.). La afero memorigas la proverbon pri la infano forfluigita kune kun la bano.

Laŭ la septembra numero de la perioda gazeto "Forumo" aperanta en Internacia Lingvo, la registraro de Haitio akuzas, ke la interrilatigado de aids aŭ Haitio fontas el rasismo. Homoseksualaj usonanoj estu elpelataj (el Haitio), Haitio ne plu toleru deflankiĝon de la seksa konduto.

La brita revuo por kuracistoj "Lancet" intertempe raportis pri la kazo de eksa monakino, kiu ĝis 1979 laboris kiel sociala laboristino inter geprostituitoj en Haitio kaj antaŭ nelonge mortis je aids en Kanado, sen ke tiu malsaniĝo povis esti atribuita al sekskontakto, narkitaĵoj aŭ sangotransfuzo. Laŭ la kanadaj kuracistoj la ununura riskofaktoro estis Haitio, kie la imuneca malsano jam estis disvastiĝinta antaŭ ol la unuaj malsaniĝoj ĉe viraj samseksemuloj estis raportitaj. Kontraŭe "New England Journal of Medicine" plej laste informis, ke la unua aids-kazo en Haitio, en julio 1978, aperis ne antaŭ la unuaj infektigoj ĉe usonaj samseksemuloj.

Laŭ studo, el 60 aids-malsaniĝintaj haitianoj proksimume 90% intertempe mortis en aĝo inter 15 kaj 65 kun la riskofaktoro "homo kaj biseksualeco".

En la londona "St. Mary's Hospital" oni efektivigis medicinajn analizojn pri aids ĉe 100 sensimptomaj samseksemuloj: 35% havis tro malmulte da limfocitoj, 40% havis reduktitan proporcion de helpaj al T-limfocitoj subpremaj, 15 havis ambaŭ difektojn, 25% havis absolute tro malmulte da helpaj T-limfocitoj, 10% havis difektajn monicitojn, 25% havis perturbitan fagocitadon: laŭ raporto de "Lancet" 1983, 126-129.

Intertempe la esploroj sin fulmorapide intersekvas: En Fr Germanio stimulaĵaj premioj estas anoncigitaj por la jaroj 1983, 1984 kaj 1985 ("Praxikurier" de la 19-a de oktobro 1983). Jam konstatigis (Helm-Frankfurt), ke aids-pacientoj ĉiam estas tuberkulin-negativaj, eĉ ĉe tuberkuloza infekto.

Francaj virusologoj de la instituto "Pasteur" en Parizo supozas, ili malkovris novan "retroviruson", pri kiu ili raportis ĉe simpozio pri aids, meze de septembro en Cold Spring Harbor/Novjorko. Ilia teorio estas, ke ripetitaj infektigoj malfortigas (!) kaj ili menciis kiel pruvo 6 (!) aktivajn samseksemulojn kun alta grado de promiskuado.

La fama Harvard-Universitato eĉ demonstris ĉe simioj la aids-infekton pere de limfaj infiltraĵoj. (Lancet 599-602, 1983). Fine d-ro Gallo de la "National Cancer Institute" Betheana/Marilando deklaris en BOno ĉe intervjuo por "Praxikurier", ke japanoj eble estas imunaj kontraŭ aids-virusoj (Praxikurier, 1983-10-19).

Kontraŭe la "New England Journal of Medicine") Bostono samtempe reportis pri duboj, ĉu virusoj ekscitas aids-on akj informis samkiel prof. d-ro Yamazoe en la decembra numero de "Medicina Internacia Revuo" (Tki, ke konekteblas funga infektado laŭ la modelo de ciklosporino, iu metabola produkto de en Norvegio malkovrita fungo, kiu ĉe organtransplantado estiĝas pro subpremo la defendadon de la propra organismo kontraŭ la fremda organ-substanco.

Pli precize pri tio neniu scias, tamen asidue misterapiĝis - kaj jam aids estas komparita kun la arbara mortado, ĉe kiu antaŭvieblas ankaŭ kolapso de biosistemo, kiel ankaŭ kun aids -

"sudden infant death syndroma", la sindromo de subita morto infana, de kiu la takso de Aĥemaj medicinistoj nur en Okcidenta Germanio kaj en la lasta jaro 2000 ĝis 4000 estis viktimoj, per spiralfunkcio, proksimume sep semajnojn post enspirado de industria smogo. Kiuj komeksoj!

Aids ĉiukaze estis trogravigita, deklari prof. Deinhardt en la dua septembra semajno ĉe la perfektiga kongreso de la germana federacia kuracista ĉambro en Morano. Kial?

Hubert Schweizer

LL LL

APILARNIL - APILARNILPROP

Originalaj rumanaj abelbredadaj produktaĵoj

APILAERNIL tablojdoj enhavas: Apilarnilon liofilizitan (ekstrakton de larvo) 0,010g kaj vehiklojn (lakozone, mangezo-stearon ktp.) ks.

APILARNILPROP enhavas krom menciitaj substancoj ankaŭ 0,016g de polvigita propoliso por unu tablojdo.

Efiko de farmakoterapio: Komplekso de naturaj substancoj, kiun oni produktas el ekstrakto de virabelo-larvoj liofilizitaj, kiu enhavas 18 aminoacidojn, kelkajn esencajn, havas biostimulan efikon pri la ĝenerala metabolo. Oni uzadas en teraio por stimuli la naturajn sindefendajn faktorojn de la homa organismo. La naturaj biostimulaj faktoroj estas riĉaj en la prekursoroj de la seksaj hormonoj. APILARNILPROP enhavas ankaŭ propolison, kiu havas sinergisman efikon pro enhavo de flavonoj, enzimoj, esteroj de la aromaj acidoj ktp. Kun antik'akteriaj, antimikozaj, kontraŭinflama, cikatriĝa, loka anestezia kaj trofiaj specifecoj.

Indikoj de la terapio: Ĝenerala korpa debileco, astenio, malnutrado, postoperacia konvalesko, ostoporozo, tarda pubereco, klimakso, seksa astenio, psika kaj korpa laciĝo kaj frua seniliĝo. APILARNILPROP havas indikojn ankaŭ en buŝkavaj afekcioj pro antiseptaj, kontraŭinflama, antibakteria, cikatriĝa kaj loka anestezia efikoj. APILARNILPROP stimulas la ĉelajn regenerajn procesojn ĉe stomatitoj, gingivaj hemoragioj, kronmika paradontozo kaj estas efika ĉe akutaj, subakutaj kaj kronikaj laringo-trakeo-bronketitoj. La daŭra kontakto kun enbuŝa, faringa mukozo, la malrapida resorbado favoras al lokajn kaj ĝeneralajn terpiajn efikojn. Ĉe glosodinio reduktas al lokajn, inflamajn fenomenojn. La cikatriĝaj kaj antiseptaj substancoj, kiujn enhavas la propoliso, havas favoran efikon ĉe la stomaka kaj duodena ulcero, gastrito, kojlitio, enterkojlito, ĉar ĝi formas protektan membranon.

Aplikado: Por la plenkreskuloj 3-8 tablojdoj, ĉiutage antaŭ manĝado.

Infanoj: 1-3 tablojdoj ĉiutage laŭ aĝo kaj kuracista indiko, ĉar enhavas ankaŭ hormonajn substancojn. La tablojdojn oni suĉas ĉe la buŝaj, laringaj, faringaj, traksaj afekcioj kaj glutas ĉe la aliaj malsanoj. La daŭro de la uzado estas kelkaj monatoj, eventuale okaze de longtempa uzado oni povas fari unumonatan paŭzon.

Pakaĵo: Flakonoj, enhavantaj 100 tablojdojn. Gardu de lumo kaj varmo!

Garantio: 1 jaro.

Produktas: Entrepreno de Medikamento, Bucuresti, Rumanio /IMB/

Esperantigis: D-ro Gábor Lázár, Cod R-4055 Covasna, Rumanio, Str. Stefan cel Mare n-ro 26/ A

ANONCO

Post trijaraj klopodoj, dum la pasinta aŭtuna IV-a Renkontiĝo de Slavoniaj Esperantistoj estis fondita la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj /IAHE/. En provizora estraro estas elektitaj por prezidanto Prof. D-ro Robert R- Robertson /Aŭstralio/, por vicprezidantoj: Inĝ. Kenet R. Jones /Usono/, D-rino Lina Gabrielli /Italio/, Nikolaj Grišin /Sovunio/, por sekretario Dušan Adnadj kaj Vujadin Kuliĉ.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn kaj neesperantistojn helpi novan Asocion. Aliĝu al ĝi kaj abonu novan gazeton. Por ĉio vi povas direkti sin al la adreso: VOĈO DE HANDIKAPULOJ, YU-56227 BOROVO, Skolska ul 2 Jugoslavio.

Kursgvidanto D-ro Karol WIERZBICKI, ul. Dabrowskiego 20b/1, PL-40031 Katowice, Pollando - serĉas korespondamikojn por siajn gestudentoj medicinaj, stomatologiaj, farmaciaj.